der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

13. Jahrgang / Nr. 82 2/1977 30 Pf

La estontaj taskoj de la esperantistoj en Kulturligo de GDR

El la referaĵo de la prezidanto de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, Rudi Graetz, dum la II-a Centra Konferenco de la esperantistoj en KL de GDR, 5.—7. 11. 76 en Leipzig

Karaj ligo-amikoj!

Ŝatataj gastoj!

Denove ni renkontiĝis por kolektive interŝanĝi spertojn pri niaj estontaj taskoj. Nia II-a Centra Konferenco jam estas la kvara granda aranĝo ĉi-speca, okazigita ekde la fondiĝo de Centra Laborrondo Esperanto antaŭ 11 jaroj. Nia lasta granda renkontiĝo estis 1974, dediĉita al la 25a jubileo de la fondo de nia respubliko.

Ekde tio multo okazis, internacie kaj nacie.

Antaŭ 6 monatoj la IX-a Partia Kongreso de la Socialisma Unuiĝinta Partio finiĝis. Ĝi fermis la ĝis nun plej sukcesan periodon en la historio de GDR, samtempe enkondukinte novan eksterordinare gravan etapon en la evoluo de nia socio. La kurso de la VIII-a Partia Kongreso plene montriĝis taŭga. Nia laborista partio realigis siajn promesojn. Por ĉiuj la laboro donis profiton, ankaŭ por ni esperantistoj en Kulturligo de GDR.

Ni, sekvante atente la evoluon de la revolucia monda proceso kaj kontribuinte al la ekflorado de nia respubliko, ni salutas la sciencan analizon de la Partia Kongreso kaj plene subtenas ties decidojn. . . .

Per sia kunsido la 24-an de septembro 1976 la prezidia konsilantaro de Kulturligo de GDR malfermis la etapon por la preparado de la IX-a Ligokongreso de nia organizaĵo, okazonta fine de 1977. Dum sia kunsido la 12an de junio 1976 en Rathenow Centra Laborrondo faris unuan pritrakton de la IX-a Partia Kongreso.

Nia II-a Konferenco tion daŭrigos en pli larĝa grado. Ankaŭ nia III-a Centra Renkontiĝo, verŝajne okazonta 1978, pritraktonte la decidojn de la IX-a Ligokongreso de Kulturligo, ankaŭ servos por la plua diskutado de nia estonta evoluo. Nome, la formulita en la Programo celo „ankaŭ

estonte elformi la maturan socialisman socion kaj tiel kreante bazajn kondiĉojn por la iompostioma transiro al la Komunismo", estas *longperioda* tasko. Ankaŭ ni esperantistoj en Kulturligo de GDR devos adaptiĝi al tiuj taskoj.

Dum la jam menciita kunsido de la prezidia konsilantaro de nia organizaĵo estis elstarigitaj precipe 6 ĉefaj direktoj, karakterizontaj la agadon de la tuta Kulturligo post la IX-a Partia Kongreso:

1. Kulturligo kunhelpas plue elformi la gvidan rolon de la laborista klaso en la kultura vivo de GDR.

2. Ankoraŭ pli celkonscie ol ĝis nun en ĉiuj sferoj oni daŭrigos kaj intensigos la internaciisman agadon.

3. Responde al la kreskanta rolo de la scienco, ĝiaj plej novaj ekkonoj ludos pli grandan rolon en spirita-kultura vivo de GDR. Tiujn postulojn Kulturligo kunhelpos realigi.

4. Nia organizaĵo kontribuos al tio, ke ankaŭ estonte regu bona atmosfero por la evoluo de arto kaj literaturo en nia respubliko.

5. Kiel tradicikonscia organizaĵo ni flegos, propagandos kaj kreive aplikos la kulturan heredaĵon de la internacia kaj germana laboristaj movadoj kaj la humanismajn atingaĵojn de la monda kulturo.

6. Kulturligo kun siaj pli ol 30 fakoj en pli granda amplekso kaj pli bona kvalito ol ĝis nun malfermos por la multnombraj inklinoj kaj interesoj de niaj civitanoj larĝan agosferon, kontentigos la ekzistantajn spiritajn-kulturajn bezonojn kaj vekos novajn, nome tiajn, kiaj respondas al la socialisma vivmaniero.

III.

Karaj amikoj!

Ni transdonis al vi skriban priagadan raporton en kiu ni klopodis tre koncize prezenti la rezultojn de nia agado ekde la I-a Centra Konferenco en 1972.

Al vi ĉiuj, estimataj amikoj, al ĉiuj grupoj kaj gvidantaroj kaj — ni tion ne forgesu — viaj familianoj ĉiam donantaj al via honorofica laboro la necesan komprenemon — al vi ĉiuj ni ĉi-tie tre kore dankas pro la farita agado. Ni ankaŭ dankas al la prezidio de nia organizaĵo kaj al la multaj gvidantaroj sur distriktj kaj subdistriktj ebenoj por la donita subteno.

La ĝis nun farita laboro estas bona bazo por la realigo de la novaj taskoj. Konsiderante la menciitajn 6 ĉefajn direktojn en la agado de

Kulturligo post la IX-a Partia Kongreso, mi volas pritrakti kelkajn problemojn de nia estonta agado:

1. Je la unua loko ni devas klopodi ankoraŭ pli bone alproprigi al ni la marksismon-leninismon. Alta politika-ideologia nivelo de civitano apartenas al la ĉefaj karakterizaĵoj de matura socialisma socio.

   Ni nur ĝuste komprenos niajn novajn taskojn kaj la perspektivon de internacia lingvo, se ni orientiĝas laŭ la ĉefaj kaj bazaj problemoj de nia tempo.

   La alproprigo de la mondkoncepto de la laborista klaso laŭ mi i. a. postulas la klarigon de jenaj demandoj:

   — Kiel ni esperantistoj, laŭ niaj revoluciaj laboristesperantistaj tradicioj, povas agadi en la laborista klaso?
   — Kiel ni atingos, ke la plej bonaj anoj de la laborista klaso ankoraŭ pli forte kunagadu en niaj grupoj kaj gvidantaroj?

2. Ni multon faris dum la priagada periodo por la plialtigo de la prestiĝo de nia respubliko eksterlande, tiel kontribuinte al la eksterlandpolitikaj sukcesoj de GDR.

   La grandan eksterpolitikan potencon de ĉ. 10 — 15 000 korespondrilatoj en pli ol 40 landoj de la mondo, disponataj de niaj esperantistoj, necesas ankoraŭ pli bone kaj kontinue gvidi laŭ enhavaj vidpunktoj. Kiel ni jam povis konstati 1974, dum la lastaj jaroj mankas la kontinueco en la perpresaĵa informado de la eksterlando. Tio estis farita en la pasinteco per bonega kvalito. Ni ĉi-rilate klopodos pri ŝanĝoj. La bonaj koloraj prospektoj de Rostock kaj Erfurt efiku instige.

   Estonte ni nepre sukcesu, kontentigi la intereson de multaj eksterlandaj esperantistoj konatiĝi kun socialismo en GDR.

3. La elformigo de la socialisma vivmaniero „estas ligita nedisigeble kun la evoluo de socialismaj personecoj", tekstas en la programo de SUPG, „kies pensadoj kaj agadoj estas karaterizitaj per socialisma patriotismo kaj proleta internaciismo."

   Konatigante nian respublikon kaj ties socialismajn atingojn en eksterlando, ni agas kiel socialismaj patriotoj.

   Sed tio nur estas unu flanko. Ni esperantistoj estas profundaj internaciistoj. Speciale ni konfesas nin al la intima alianco kun USSR kaj la aliaj socialismaj frataj landoj.

   Ni povas kontenti pri la evoluo de niaj rilatoj al niaj frataj landoj. Tamen, kompreneble, ankoraŭ multo estas atingenda. Ĉiu grupo klopodu ligi firmajn rilatojn al grupoj en USSR, Pollando, ĈSSR kaj en la aliaj fratai landoj. Sekvontjare ni celebros la 60-an jubileon de la venko de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio.

   La Distriktaj kaj Subdistriktaj Laborrondoj certe utiligos tiun memortagon per dignaj aranĝoj.

   La rilatoj al la Pola kaj Ĉeha Esperanto-Asocioj plue evoluos kaj pliprofundiĝos sur kontrakta fundamento.

Esenca tasko estas, kunhelpi en la disvastigo de la kulturaj riĉaĵoj de niaj socialismaj frataj landoj. Ni pli sisteme devas disvastigi ilian esperantigitan literaturon, organizi amikecvesperojn kulturajn pri unuopaj landoj kaj inviti interesajn prelegantojn.

Tio postulas bonan perspektivan planadon. Precipe ni devas enkadrigi niajn ĉi-koncernajn aktivecojn en la ekzistantajn komunumajn urbajn ligojn.

Ĝuste pritaksante, ke entute atingis pli altan kvaliton la multflanka kunlaboro de la Esperanto-asocioj de la socialismaj landoj, ni volas elstarigi la grandan signifon de la IX-a Konsultiĝo okazonta de la 13-a ĝis la 18-a de decembro 1976 en Moskvo. Ĝi estas dediĉita al la 60-a jubileo de la Venko de la Oktobra Revolucio.

Multajn aktivecojn ni dediĉos al tiu grava jubileo. Hodiaŭ ni povas konkludi, ke la plej bone integrita unuo de la internacia Esperantomovado estas tiu de la socialisma ŝtataro.

En la ŝtatoj de nia socialisma komunumo troviĝas la plej forta kaj plej aktiva parto de la Esperanto-movado de la mondo. Tio estas signifoplena fakto kaj ankaŭ respondecigos nin, GDR-esperantistojn, ĉiam digne kontribui en la Esperanto-movado de la socialisma ŝtataro kaj en tutmonda skalo.

Mi ĝojas informi vin pri tio, ke antaŭ 14 tagoj fondiĝis Esperanto-Komisiono ĉe la Akademio de Sciencoj de Socialisma Rumana Respubliko. Tio estas plia fortigo de niaj movadoj.

Karaj amikoj! Ni ĉiam pensas kaj agas kiel anoj de la granda socialisma ŝtataro. La 63-a Universala Kongreso de Esperanto okazos 1978 en Varna. Samjare estos la TEJO-Kongreso en Tirnovo. Ili devas esti plenforte subtenataj ankaŭ de ni. Estos gandiozaj neforgeseblaj travivaĵoj. Ni jam nun komencu, pariĝi por la partopreno en tiuj kongresoj.

La VII-a Ĝenerala Konferenco de MEM, okazinta la 13-an de julio ĉi-jare en Ruse/Bulgario, prenis signifoplenajn decidojn por ankoraŭ pli intima kunlaboro kun la Monda Packonsilantaro por fortigi la antiimperiisman batalon. Pri tio ni raportos en „der esperantist“ 6/76. La ĝenerala sekretario de MPK, Romesh Chandra, antaŭ nelonge donis intervjuon al „Paco“, tie substrekante la grandan valoron de la antiimperiisma agado de la esperantistoj.

Tio estas alta respondeco! Ni devas estonte pligrandigi nian kontribuon en MEM. Por tio antaŭ kelkaj monatoj ni fondis ĉe Centra Laborrondo MEM-Komisionon, kiu ellaboru proponojn. Ekz. estonte ni devas pli atentigi la demandojn de la batalo por senarmigo, konsiderante la gravajn proponojn de USSR por tutmonda konferenco pri senarmigo.

Ĉi-rilate meritas mencion la nova alvoko de Stokholmo, publicita en „Paco“ kaj „der esperantist“.

Kompreneble ni ne cedos en nia solidareco por la subpremata ĉilia popolo kaj ĉiuj aliaj popoloj, batalantaj kontraŭ imperiisma subpremo. Ankaŭ estonte ni ne malkreskigos nian subtenon por la vjetnama popolo, kiu rekonstruadas sian patrion.

4. La prezidumo de nia organizaĵo (Kulturligo) la 18. 9. 1976 prenis decidon pri la flego de la kultura heredaĵo. Por ni estis kaj estas la okupiĝo pri la tradicioj dé la revolucia internacia kaj germana laborista Esperanto-movado ĉiam pli ol nur retrospektiva hisoriumado. La tradicioj ĉe ni vivas! Ni pripensu, kalmaniere ni povus gajni por la pretigo de la valora heredaĵo ankoraŭ pli forte la iamajn membrojn de Germana Laborista Esperanto-Asocio.
   Tio ankaŭ gravas por skribota libro sub la titolo „Pri la historio de la internacia kaj germana laborista Esperanto-movado", aperonta germanlingve en sekvontaj jaroj.
   Kunlige al tio mi volas starigi alian demandon: Kiu jam nun skribas la historion de nia agado?
   Ĉiuj grupoj kaj Distriktaj Laborrondoj devus daŭre registri sian agadon kaj eble skribadi kronikojn, por ke la estontaj aŭtoroj de „Historio de la Esperanto-movado en GDR" ne staru antaŭ similaj malfacilaĵoj, kiuj devas esti venkataj de la historiistoj skribantaj la historion de la laborista Esperanto-movado.

5. De speciala signifo por nia estonta agado ŝajnas esti, ke ni devas pligrandigi nian kontribuon per la solvo de taskoj en la intereso de la *tuta* Kulturligo. Ni bedaŭrinde ankoraŭ ne sufiĉe bone sukcesis en kunlaborado kun la aliaj fakoj. Kie estas la komunaj projektoj de filatelistoj kaj esperantistoj, de fotoamatoroj kaj esperantistoj, de naturamikoj kaj esperantistoj? Aŭ kie estas la valoraj taskoj, kiujn devus realigi komune la filatelistoj, fotoamatoroj, naturamikoj kaj aliaj fakoj kune kun la esperantistoj?

6. En la dokumentoj de la IX-a Partia Kongreso kelkfoje estas akcentata la pligraviĝanta rolo de scienco kaj tekniko por la maturiĝanta socialisma socio. Ni klopodis starigi kaj prilabori sciencajn problemojn lige kun la funkciado de Esperanto kiel internacia komunikilo kaj kiel lingvoscienca fenomeno.
   Tamen, ni tre ĝojus, se pli da esperantistoj sin engaĝus por tiu problemaro pere de konkretaj kontribuoj.
   La laboroj de prof. Falkenhahn, d-roj Blanke kaj Ruff kaj Karl Raabe instigu al similaj aktivecoj. La eblecoj al fruktodona kunlaboro kun fakuloj el USSR, ČSSR, Hungario kaj aliaj landoj, abundas.
   Kelkaj specialistoj el la frataj landoj, ekz. prof. d-ro. Isaev, d-ro. Jermař kaj d-ro. Ratkaj estas inter ni.
   Sed ankaŭ aliaj vidpunktoj koncernas la sciencon.
   Kie estas la matematikistoj, medicinistoj, kemiistoj, kibernetikistoj aŭ filozofoj en GDR, konantaj Esperanton kaj aplikantaj ĝin en siaj fakoj, tiel donante valoran kontribuon al la evoluo de Esperanto kiel lingvo de scienco?
   Ĉi-rilate ni ankoraŭ multon devas lerni de niaj amikoj el la frataj landoj.

(daŭrigo p. 6)

★

La „Trigroŝa Romano" de Bertold Brecht aperos 1977 en Esperanto. La mondfama romano ampleksos ĉirkaŭ 400 paĝojn kaj kostos ĉ. 4 dolarojn.

Antaŭmendojn akceptas Edition Leipzig, 701 Leipzig, Postfach 340, kaj Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, DDR - 108 Berlin, Charlottenstr. 60.

Mendu tuj!

Karaj amikoj!

Mi volas paroli pri tre grava problemo, koncernante senpere la vivdemandon de niaj grupoj kaj ilian elradiadon.

Kiuj estas la kaŭzoj, ke la nombro de la grupoj stagnadas, aliĝas nur relative malmultaj novaj membroj aŭ multaj kursfinintoj ne partoprenas nian agadon?

La raporto de la CK de SUPG al la IX-a Partia Kongreso substrekas, ke la spiritaj-kulturaj interesoj kaj bezonoj de la laboruloj ne nur plimultiĝas sed ankaŭ fariĝas pli kaj pli multflankaj. Ĉu ni konas la bezonojn kaj interesojn de niaj membroj? Ĉu ni scias, kion esperas kursfininto de la grupa vivo? Ĉi-kampe ni devas tre sisteme analizi. Kaj konante iujn bezonojn, ekz. konkrete *apliki* Esperanton por profesiaj kaj aliaj interesoj, kiujn eblecon kun kia nivelo ni ofertas?

Pro objektivaj procesoj, i. a. de la socialisma integriĝo, daŭre kreskadas la bezono al fremdlingvaj konoj de niaj civitanoj, al internacia komunikado, al amikaj rilatoj kun civitanoj de niaj frataj landoj kaj kun aliaj progresemaj homoj. Mi kredas, ke estonte ni devos pli multe eliri en nia agado de tiuj bezonoj. Se ni vere kontentigos *realajn* bezonojn, tiam niaj grupoj kaj kursoj devus plifortiĝi. Tiam nia agado pli forte elradios kaj interesigos pli da civitanoj por la internacia lingvo.

Ni jam intensive diskutis la problemojn de la junulara agado kaj de la gvidlaboro dum la I-a Centra Renkontiĝo en Berlin. Mi volas reatentigi pri la koncernaj kontribuoj en „der esperantist“ 55/56 kaj 65/66. La tie skribita tute validas ankaŭ hodiaŭ kaj estas retuŝita en la priagada raporto. Tio ankaŭ koncernas la neceson, plialtigi la lingvajn kapablojn kaj la scion pri la problemoj de la Esperanto-movado, pri interlingvistiko kaj esperantologio. Ankaŭ pri la perspektivo de la internacia lingvo Esperanto ni siatempe dum la I-a Centra Konferenco diris validan. Sed ĉar tiu problemo kompreneble nin daŭre interesas, mi volas retuŝi ĝin. La perspektivoj de nia internacia lingvo kaj de nia agado estas determinataj unuavice per objektivaj procesoj. La proceso de la malstreĉiĝo, la sukcesa batalo kontraŭ imperiisma popolsklaviĝo, la scienca-teknika revolucio, ĉio-ĉi stimulanta kaj akcelanta la daŭran plifortigon de la fortoj de l'socialismo kaj de la progreso, estas tiaj objektivaj fenomenoj, postulantaj pli kaj pli internacian lingvan komunikadon, akcelantaj ĉiam pli kaj pli la bezonon de la homoj al internacia komunikado. Ĉi-rilate speciale gravas, ke la lingvan komunikadon oni ne bezonas pro si mem. Oni bezonas ĝin kiel unu el la multaj rimedoj necesaj por starigi, kiel diris Marks, la historion de la homaro de la kapo sur la piedojn, por la kreo de internacia pacordo.

La klerigaj kaj edukaj valoroj, la eblecoj enestantaj en la okupiĝo pri Esperanto por la pliriĉigo de la homa personeco, ni tion pritraktis en nia priagada raporto, estas tiom grandaj, ke valoras, utiligi tiujn valorojn pli kaj pli por la socialisma vivmaniero, por sencohava, enhavriĉa kaj bela vivo en socialismo.

Tio al ni ĉiam pli kaj pli bone sukcesu, por la ĝojo de l'individuo kaj por la bono de l'tuta socio!

El la Novjara Mesaĝo de la Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio d-ro Humphry Tonkin:

Estas bela periodo por labori por Esperanto

La pasintaj du-tri jaroj instruis al ni multajn lecionojn. El ili, la plej klara estas la rimarkinda stabileco kaj interna forteco de la Esperanto-movado. Se necesus ankoraŭ pruvi tion, oni povus konstati, ke la Internacia Lingvo fariĝis neevitebla kaj nedetruebla fakto de nia epoko. La kulturo kaj socio de Esperanto estas firma elemento en la nuntempa internacia vivo.

Tio estas pli ol klara en la situacio de UEA mem. Tra ĉiuj perturboj de la tuj pasintaj jaroj, tra ĉiuj krizoj financaj kaj organizaj, UEA tenis la flagon alta kaj laboris diligente por konservi malnovajn gajnojn kaj prepari la grundon por novaj.

Nun ni komencas rikolti la rezultojn de tiu eksterordinara diligento — kaj ankaŭ lojalo — de nia centra stabo kaj nia membraro. En 1975 ni sukcesis registri pozitivan saldon post kelkjaraj deficitoj en niaj financoj. Feliĉe ni povas anonci similan rezulton en 1976. Kvankam la finkalkulo ankoraŭ ne estas preta, estas jam nun informeble, ke 1976 ankaŭ estos jaro de financa pluso. Tiu restarigo de la financa stabileco ankaŭ havis siajn konsekvencojn ĉe la membronombro: post kelkaj jaroj da perdo, en 1976 ni registris malgrandan gajnon en la nombro de individuaj membroj. Se oni aldonas al tio la aliĝon de kelkaj novaj landaj asocioj kaj la signifan plivastiĝon de la kolektiva abonado de la revuo, oni tuj ricevas bildon de asocio pli sekura, pli forta, kaj pli laborpreta ol ni vidis jam de pluraj jaroj . . .

Estas bela periodo por labori por Esperanto. Kvankam la publiko restas skeptika, fermita en la propraj interesoj, ema al la propra prospero — iom post iom, malraide sed senteble, ni lernas kiel alpaŝi ĝin kaj kiel disciplini nin mem en la intereso de la pli granda idealo. Ĉefe ni ankoraŭ devas lerni kiel konvinki la publikon pri la graveco de la lingva demando — pri la danĝeroj de lingva superregado kaj lingva diskriminacio, pri la kostoj de lingva diverseco, pri la neceso de tutmonda komunikilo — kaj en tiun kuntekston injekti la ideon de la Internacia Lingvo Esperanto, sola praktika solvo de la tutmonda lingva problemo . . .

La jaro 1977 portos nin al punkto nur dek jarojn for de la unua jarcento de la Internacia Lingvo. Ĉu tiu dekjara periodo kondukos nin al la sojlo de sukcesigo de la heredaĵo de Zamenhof? Tio dependos grandparte de nia kapablo je sagaco, sindediĉo kaj efika laboro . . . Nome de la Estraro de UEA kaj ĉiuj aliaj aktivuloj en ties organiza strukturo, mi deziras al vi pacan kaj prosperan jaron 1977.

*

Altaj distingoj por Otto Bäßler

Okaze de lia 80-a naskiĝtago Otto Bäßler ricevis la plej altan distingon de Kulturligo de GDR la „Johannes R.-Becher-medalon en oro". Krome la Internacia Komitato de MEM distingis la jubileulon per la Honorinsigno de MEM.

David Lvoviĉ Armand
1905—1976

La 28an de novembro en la jaro 1976 forpasis David Lvoviĉ Armand, fama soveta scienculo, doktoro de geografiaj sciencoj, profesoro, vicprezidanto de Komisiono pri Koordigo de Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj en Ligo de Sovetaj Societoj por Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando.

La tuta vivo de tiu ĉi talentplena homo de granda energio kaj animo estis dediĉita al nobla afero, honesta servo al la scienco kaj la paco. D. L. Armand naskiĝis la 14an de aprilo 1905. Li kreskis en familio de intelektuloj, kies tradicioj estis patriotismo, amo al scienco kaj laborema popola, senlaca laboro por noblaj celoj.

Kiam li estis knabo kaj vizitis lernejon li renkontiĝis kun blinda homo de neordinara sorto kaj flama koro, Vasilij Eroŝenko, fama vojaĝisto, muzikisto, poeto, socia aganto. Sekvante lian epzemplon, la juna David ekposedis la internacian lingvon Esperanton kaj restis la tutan vivon aktiva propagandisto de la ideo de uzado de artefarita internacia lingvo por grandaj celoj: lukto por paco, kulturaj kaj sciencaj ligoj inter popoloj.

Kiam proksímiĝis la studenta aĝo, David Armand komencis studi en la Moskva Elektroteknika Instituto, finis ĝin kaj ricevis diplomon de inĝeniero. Li laboris en la kvalito de inĝeniero en moskvaj uzinoj kaj dum la tempo de tiu ĉi laboro li ricevis grandan kaj riĉan sperton en la kampoj de produktado. Tiu ĉi laboro, tiu ĉi riĉa sperto tre bone helpis al li en sia estonta scienca laboro.

Laborante kiel inĝeniero, David Armand decidas ŝanĝi sian profesion kaj dediĉi la alian parton de la vivo al la scienco. Li denove studis — nun en geografa fakultato de la Moskva Ŝtata Universitato. Post la fino de la Universitato ĝis la fino de sia vivo li senlace laboras en la kampoj de geografia scienco.

Li fariĝis doktoro de geografiaj sciencoj, profesoro. Li estas aŭtoro de pli ol 100 sciencaj laboroj. Inter ili — esploroj pri geografio de diversaj landoj de Eŭropo, Azia kaj Amerika kontinentoj, esploroj pri problemoj de ekonomia geografio, pri problemoj de dislokigo de produktadaj fortoj sur terenoj de landoj, problemoj de evoluo de agrikulturo. Tre gravan parton de lia scienca agado fariĝis la senlaca, nobla lukto por la protektado de la naturo. Lia mondkonata libro „Por ni kaj por la nepoj“ apartenas al la brilaj, signifoplenaj sciencaj laboroj pri problemoj de la defendo de naturo — unu el la plej gravaj problemoj de nia tempo.

David Armand aktive partoprenis la esperantistan movadon. Multe da jaroj li estis vicprezidanto de la Komisiono pri Koordigo de Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj. Li reprezentis la sovetan esperantistaron en internaciaj kongresoj de UEA en Sofio, Vieno, Budapeŝto, Kopenhago

kaj aliaj renkontiĝoj de esperantistoj de diversaj landoj. Moskvaj esperantistoj rememoras liajn interesajn, signifoplenajn prelegojn en la Moskva Domo de Scienculoj, en la Moskva Esperantista Klubo. Li gvidis grupojn por la studo de Esperanto. Kune kun E. Bokarev, A. Berg li skribis kaj publikigis artikolon pri la neceso solvi problemon de internacia lingvo por sciencaj kaj kulturaj ligoj. (kp. „der esperantist" 65/66, 3–4/1974) Li aktive partoprenis en sciencaj diskutadoj pri tiuj ĉi demandoj.

La morto de David Lvovič Armand estas peza perdo por la scienco, por la tuta progresema esperantista mondmovado.

La progresemaj esperantistoj de la tuta mondo neniam forgesos tiun ĉi senlacan, laboreman homon, kies vivo estis sen resto dediĉita al honesta kaj honora servo, al la lukto por mondpaco, por la progreso.

G. Korotkevič, Moskvo

★

La esperantistoj de Germana Demokratia Respubliko havis la eblecon persone konatiĝi kun la simpatia sciencisto en 1974 en la kadro de la II-a Centra Renkontiĝo en Berlin, Tiuj, kiuj havis la eblecon persone paroli kun li, neniam forgesos lian modestecon, lian personan ĉarmon. La lasta verko, kiu aperis pri interlingvistika problemo el la plumo de prof. Armand estas la kontribuo „La homaro kaj la oceano de informado" en „Problemy interlingvistiki" (Moskvo 1976). Al la edzino de prof. Armand, botanikistino kaj fervora esperantistino, ni esprimas nian profundan kondolencon. *CLE*

★

KOMUNIKO

de la X-a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj el eŭropaj socialismaj landoj

En la tagoj de la 10-a ĝis la 13-a de marto 1977 j. en Karl-Marx-Stadt (GDR) okazis la X-a Konsultiĝo de Esperanto-orgnizaĵoj el la jenaj landoj: Bulgario, ČSSR, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio.

La Konsultiĝo pridiskutis demandojn kaj problemojn de la daŭra kunlaboro de la reprezentitaj organizaĵoj. La partoprenintoj de la Konsultiĝo substrekis la signifon de la 60-jara jubileo de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio, informis pri entreprenataj ĉi-koncernaj iniciatoj kaj priparolis multflankan kunlaboron lige kun ĉi tiu granda datreveno.

Specialan atenton oni turnis ankaŭ al analizo de la atingoj kaj farendaj taskoj en la porpaca agado de la esperantistoj, lige kun la antaŭstaranta internacia Asembleo de la Packonstruantoj en Versovio (majo 1977).

Oni pridiskutis formojn de la praktika kunlaboro en la sferoj de scienco, inkluzive interlingvistikon, kulturo, turismo, reciproka informado, kaj ankaŭ kunlaboron kun UEA en ĉi tiuj sferoj.

La Konsultiĝon partoprenis ankaŭ gvidantoj de la junularaj sekcioj de la reprezentitaj organizaĵoj.

Estis formulitaj rekomendoj por praktika kunagado.

Oni decidis pri la preparo kaj organizo de la XI-a Konsultiĝo.

La Konsuitiĝo esprimis specialajn dankvortojn al Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, kiu amike gastigis la delegaciojn.

Karl-Marx-Stadt, la 13-an de marto 1977

D-ro István Szerdahelyi

Planlingvistika dokumentaro IV

(daŭrigo el „ĉe“ n-ro 79)

5. VELICS / 'veliĉ' /

Lászlófalvi Velics Antal, D-ro, kuracisto

S N-ro 327, p. 71: nekompleta titolo, misa informaĵo! Same: misinformita de *S* en *M* p. 164 ĉe „Adamitik“.

Laŭ Velics ĉiu vorto de la nuntempe funkciantaj lingvoj devenas el 7 praelementoj de la homa pralingvo. Tiuj ĉi praelementoj estas en la ĉina / ne hungar-slava / Stojan / kaj ne hungara / Monnerot-Dumaine / lingvo, do la pralingvo de la homaro estis la ĉina kaj ĉiuj aliaj lingvo / ankaŭ la hungara / originas en la ĉina.

Ĉi-koncernaj verkoj:

— A khinai nyelv szerepe az ural-altáji, indo-európai és sémi nyelvekben, Budapest, 1899.

— Über die Urquelle aller Sprachen, Eine Studie, Budapest, 1900.

— A nyelvek egységéről vagy: Hogyan beszéltek magyar eleink, Budapest 1901.

—, Über die Einheit der Sprachen, Budapest, 1902.

—, Über Ursprung und Bedeutung der Wörter / Versuch einer Systematik /, Budapest 1904.

—, Nyelvegység és hangutánzás, Rendszertani tanulmány, Budapest, 1905.

—, Versuch eines natürlichen Systems in der Etymologie, Breslau 1905.

—, Kereszténységszociális irányeszmék / Adalékok a kereszténységszociális programmhoz /, Budapest 1906.

—, Onomatopöie und Algebra / Eine etymologische und Sprachphilosophische Studie /, Budapest, 1909.

—, Un nouveau système de linguistique, Etude sur l'origine, l'évolution et l'unité des langues, Davos-Platz. 1909.

—, Kotoba no nazo / The problem of languages, the mystery of words /, Tokyo, 1911.

Laŭ la opinio de Velics, oni devas rekonstrui tiun ĉi pralingvon kiu — ĉar estas la komuna lingvo de la homaro, same fariĝos la komuna lingvo universala. Tiun sciencon li nomas „Adamitic“ kaj la lingvon adamitika lingvo. La principojn li komunikis en la verko:

Über die Mnemotechnik der Zukunft, Die einzige natürliche Grundlage zum leichtesten Erlernen fremder Sprachen, Ein linguistisches Testament, von Med. Dr. Anton von Velics, Budapest, 1912.

Fotokopio el la verko kun la tuta teksto kiu koncernas nian temon:

[2] Die neueste Wissenschaft, *Adamitik*, würde wahrscheinlich verdienen, den Schülern der höheren Gymnasial- und Realklassen (während den Sprachvorträgen) kurz vorgeführt und erläutert zu werden. Die jungen Studirenden würden daran ebensoviel Ergötzung finden, wie in ihrem späteren Leben beim Sprachstudium daraus praktischen Nutzen schöpfen. Dadurch würde das System stufenweise entwickelt und ausgebaut werden und nach und nach zur Begründung einer ebenso festen wie praktischen *adamitischen Universalsprache* führen.

Ich lade nun die Lehrkräfte der Mittelschulen *aller Länder* zu einem wissenschaftlichen Sport neuester Art ein: nämlich zur Redigirung der «*Adamitik*», einer praktisch und populär gehaltenen Monatsschrift (für Ursprache, adametische Universalsprache und Mnemotechnik) in zwei Sprachen, nämlich in der bezüglichen Muttersprache und in englisch verfasst und im 8° Format meines vorliegenden Heftes gehalten, damit man die Hefte sämmtlicher Länder in gleichen Bänden vereinigen könne. Der Ideenaustausch zwischen den einzelnen Ländern würde also durch die Monatsschrift selbst und in englischer Sprache geschehen. Jedem Lande würde da die Aufgabe zufallen: *a)* sämmtliche Wörter der eigenen Sprache nach meinem Systeme zu analysiren *b)* zu den übrigen Programmpunkten geeignete Beiträge zu liefern. Die bisher auf Volapük, Esperanto, Pan-Kel, u. s. f. vergeudeten Kräfte sollten sich von nun an in der Beförderung der *Adamitik* vereinigen!

En sia dua „adamitika" verko, aperinta en angla lingvo, Velics difinas jene sian koncepton / adamitic, or adamistic universal language, p. 123, /: „*Adamitics* is an interlingual and new branch of philology, wich by aid of physiology, psychology and logics is destined to find out the oldest sources of human speach: the evolution and development of words and ideas" / p. 5./:

en: „Adamitic, An essay on first man's language or the easiest way to learn foreign languages, for the use of middle- and highschools written by Anthony de Velics M. D., Budapest 1914. (Fino)

★

Ĝemelurbaj kontaktoj de Esperantistoj: Magdeburg – Ŝumen

La 18-an de aŭgusto 1976 okazis aranĝo de la Esperanto-grupo „Vekiĝo" en Ŝumen. Ĉefe oni rememoris per raporto pri la faŝista murdo de Ernst Thälmann dum la jaro 1944 en la Koncentrejo Buĥenvald. Partoprenis gasto de la ĝemela urbo Magdeburg. Esperanto-amiko Trenne el Magdeburg parolis pri la historio de la urbo Magdeburg. Ŝumenaj Esperanto-amikoj demandis pri diversaj aferoj rilantaj la ĝemelon urbon. Oni devas konstati, ke malgraŭ la somera libertempa sezono la aranĝon partoprenis pli ol 20 geesperantistoj el la urbo.

En Ŝumen nuntempe ekzistas tri diversaj societoj:

— la urba grupo „Vekiĝo" (la plej tradicia Esperanto-grupo de Ŝumen)
— la fabrika grupo de la aŭtomobila entrepreno „MADARA"
— la studenta Esperanto-grupo de la pedagogia instituto (la plej juna Esperanto-grupo de Ŝumen).

M. Trenne

Internaciaj turismaj aranĝoj 1977

II-a parto

(kp. „de“ 1/77)

Signifo de la uzataj mallongigoj:

N: Nomo de la aranĝo
P: Prezo
A: Aliĝdato
T: Temo de la aranĝo
R: Rimarkoj
JA: Junulara aranĝo
K: Korespondadreso
O: Organizanto de la aranĝo

Bulgario:

17.—30. 6. 77 — Burgas / „JA“ — 11—15 j.
N: Infana Esperanto-Tendaro
OK: DK de BEA, Smoljan, P. K. 30

16.—26. 9. 77 — Pamporovo
N: Ora Esperanto-Feriado
OK: DK de BEA en Smoljan, P. K. 30

ČSSR

● Somera Esperanto-Tendaro

La Esperanto-Klubo, loka grupo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Třebiĉ sub la aŭspicio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio aranĝos la 25an Someran Esperanto-Tendaron / SET /. Ĝi okazos de 17. 7.—30. 7. kaj 31. 7. ĝis 13. 8. 77 en du etapoj en la tradicia loko apud la granda valbaraĵa lago de Vranov ĉe la vilaĝo Lanĉov / distrikto de la urbo Znojmo.

La instruado de Esperanto okazos en ĉarma romantika regiono ĉiutage krom la dimanĉo de la 8-a ĝis la 12-a horo en kvin diversgradaj kursoj nome A — por komencantoj, B — por progresintoj, C — konversacia, D — por estontaj instruantoj, E — por tradukantoj.

● Somera Esperanto-lernejo / SELZO-77 / Zvolen, 10.—23. 7. 1977 Loĝigo en la turisma hotelo en la ĉambroj 3—4 litaj kaj en 4 litaj kabanetoj ĉe la hotelo HRON en banloko Sliaĉ proksime al urbo Zvolen.

La unua servo — vespermanĝo 10. 7., la lasta servo — tagmanĝo 23. 7. 77.
En la programo:

1. Esperanto-kursoj: A por komencantoj, B konversacia, C por progresintoj
2. Banado en termalakvaj basenoj
3. Ekskursoj al urboj Zvolen, Banská Bystrica, banloko Kováĉova
4. Kulturaj aranĝaĵoj vespere
5. Projekziado de filmoj kaj diapozitivoj.

Instruado: 5 instruhoroj tage krom sabato kaj dimanĉo, partoprenо en la kursoj estas deviga.

Programaj specialaĵoj: Ekskurso al Zvolen-kastelo, ekskursoj al la proksimaj arbaroj kaj montaroj.

Manĝado: 3 foje po tage.
Kotizo: 1100 Kčs.

Malfermo de la lernejo: La 10an de julio je la 17-a horo en hotelo HRON, banloko Sliaĉ, fervoja stacio Sliaĉ kŭpele. Fino de la lernejo: la 23an de julio antaŭtagmeze.

Aliĝilojn akceptas: Ján Dovčík, SELZO-77, 962 33 Budča č. 20 okr. Zvolen, ČSSR.

● Kultura kaj turisma festivalo, Zvolen-Sliaĉ, 23.—29. 7. 77. Loĝigo en la turisma hotelo kaj kabanetoj če la hotelo HRON en banloko Sliaĉ proksime al Zvolen. Čambroj 3—4 litaj, varma akvo en komunaj duŝejoj.

La unua servo — vespermanĝo 23. 7., la lasta tagmanĝo 29. 7. 77.
En la programo:

1. Perpiedaj kaj peraŭtobusaj ekskursoj al proksima montaro kaj groto
2. Trarigardo de historiaj lokoj en Zvolen kaj Banská Bystrica
3. Vizito de memorlokoj de Slovaka nacia revolucio
4. Vespere kulturaj programoj kaj projekciado de diapozitivoj.

Programa specialaĵo: banado en termalakvaj basenoj en Sliaĉ kaj Kováčová.
Manĝado: 3 foje tage.
Kotizo: 600 Kčs.

Aliĝilojn akceptas: Ján Dovčík, 962 33 Budča č. 20, okr. Zvolen.
Rimarkigo: Fervoja stacidomo Sliaĉ kupele. Če la stacidomo estos servo de la lokaj esperantistoj.

● Turisma semajno en Slovaka Paradizo (TUSE-77), Sp. Nová Ves, 13.—19. 8. 1977.

Loĝigo en turismaj domoj kaj kabanetoj en la čambroj 4—6 litaj, varma akvo kaj duŝoj en komuna lavejo. Turisma kampadejo Tatran troviĝas proksime al Sp. Nová Ves. kiu estas ankaŭ la lasta fervojstacio. La kampadejo troviĝas kelkaj centmetroj de turisma centro čingov en direkto al vilaĝo Sp. Tomášovce.

La unua servo — vespermanĝo la 13an de aŭgusto, la lasta servo tagmanĝo la 19-an de aŭgusto 1977.

En la programo:

1. Perpiedaj ekskursoj al la karstaj kanjonoj de Slovaka Paradizo/Kysel, valo de Hornád, Klauza, Sokol, Suchá Belá /.
2. Perbusaj ekskursoj al Groto de Dobŝina (glacia) kaj Popradské pleso en Altaj Tatroj.
3. Bivakfajro kaj kantado.
4. Projekciado de diapozitivoj.

Programaj specialaĵoj: ekskurso por la amikoj de flaŭro al la valo, kie estas riča kaj interesa flauro, vizito de la fama historio urbo Levoča.
Manĝado: 3 foje tage.

Aliĝilojn akceptas: Peter Pavŭk, Konrádova 6/8, 052 01 Sp. Nová Ves.
Rimarkigo: Če stacidomo en S. N. Ves estos la 13an de aŭgusto servo de esperantistoj.

Turisma semajno jam estas tradicia aranĝaĵo pri kiu estas granda intereso speciale en eksterlando. Raviga naturo kaj amika medio de esperantistoj ebligas travivi neforgeseblajn travivaĵojn.
Kotizo: 600 Kčs.

● Somera Esperanto-lernejo / SELKO-77 / Košice, 31. 7.—13. 8. 1977.

Loĝigo en la turisma hotelo en la ĉambroj 3—4 personaj, varma akvo, komunaj duŝoj. Hotelo troviĝas ĉe akvobaraĵo »Ružin« apud vilaĝo Košická Belá, proksime al Košice. La unua servo — vespermanĝo 31. 7., la lasta servo — tagmanĝo 13. 8. 77.

En la programo:

1. Esperanto-kursoj: A por komencantoj, B konversacia, C por progresintoj, D seminario
2. Banado, naĝado
3. Ekskursoj al vilaĝo Opátka, al montaroj, al urbo Košice
4. Kulturaj aranĝaĵoj vespere
5. Vesperaj bivakfajroj.

Instruado: 5 instruhorojn tage krom sabato kaj dimanĉo, partopreno en la kursoj estas deviga. Programaj specialaĵoj: boatado, kolektado de arbaraj fruktoj kaj fungoj, ekskursoj al proksimaj arbaroj, projekciado de lumbildoj. Manĝado: 3 foje tage.
Kotizo: 1100 Kčs.

Malfermo de la lernejo: la 31an de julio je la 17a horo en hotelo Sivec, Košická Belá, fervoja stacidomo kaj flughaveno Košice. El Košice oni veturas per aŭtobuso en direkto al vilaĝo Opátka / 23 km /. Post alveno al Košice aliĝu en Esperanto-Klubo, Svätoplukova 31 / Uzlový klub ČSD, 10 minutoj piede de la stacidomo en Košice. / Fino de la lernejo: la 13an de aŭgusto 1977 antaŭtagmeze. Aliĝilojn akceptas: Esperanto-Klubo, Dom Umenia, Dr. E. Erby, 041 23 Košice.

En Somera Esperanto-Lernejo ĉiujare renkontiĝas pli ol 100 esperantistoj el diversaj landoj.

Pollando

● Medicinista Esperanto-Konferenco

Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco okazos en Krakovo de 13-a ĝis 17a de julio. Esperantlingvaj medicinaj prelegoj duon- kaj tuttagaj ekskursoj, vizito de farmacia fabriko estas en la programo. La Kotizo: 1100 Złotoj. Limdato por aliĝo: 15a de majo.
Inf.: W. Opoka, ul Orzegórzecka 20, PL - 31 - 531 Kraków.

● 5.—18. 6. 77 — Bydgoszcz — Funka — Gdansk

N: Ĉelaga Esperanto-Feriado 33 — EPF
OK: „Juventur“
P: 2400 Zł. A: 5. 5. 77

● 7.—21. 6. 77 — Wladyslawowo — Hel — Gdansk

N: Ĉebalta Esperanto-Feriado: 22 — EPW
OK: „Juventur“ P: 2250 Zł. A: 7. 5. 77

● 15.–28. 6. 77 – Bydgoszcz – Tleń – Gdansk
N: Ĉebalta Esperanto-Feriado 31 – EPT
OK: „Juventur“ P: 2400 Zł. A: 15. 5. 77

● 19. 6.–2. 7. 77 – Bydgoszcz – Funka – Gdansk
N: Ĉelaga Esperanto-Feriado 34 – EPF
OK: „Juventur“ P: 2400 Zł. A: 19. 5. 77

● 21. 6.–5. 7. 77 – Wladyslawowo – Hel – Gdansk
N: Ĉebalta Esperanto-Feriado 23 – EPW
OK: „Juventur“ P: 2250 Zł. A: 21. 5. 77

● 1.–8. 7. 77 – Bydgoszcz – Świecie – Gdansk-W – WA
N: TEJO-Feriado por mezlernejanoj 15–20 j. „JA“ – 7 – EPS
OK: „Juventur“ P: 1200 Zł. A: 1. 6. 77

● 5.–19. 7. 77 – Wladyslawowo – Hel – Gdansk
N: Ĉebalta Esperanto-Feriado 24 – EPW
OK: „Juventur“ P: 2250 Zł. A: 5. 6. 77

● 8.–15. 7. 77 – Warszawa – Bydgoszcz – Janikowo – Poznan – Warszawa
N: TEJO-feriado por mezlernejanoj 15–20 j. „JA“ 8 – EPJ
OK: „Juventur“ P: 1350 Zł. A: 8. 6. 77

● 15.–22. 7. 77 – Warszawa – Bydgoszcz – Janikowo – Poznan – W-Wa
N: TEJO-Feriado por popollernejanoj 11–15 j. „JA“ 9 – EPJ
OK: „Juventur“ P: 1350 Zł. A: 15. 6. 77

● 19. 7.–2. 8. 77 – Wladyslawowo – Hel – Gdansk
N: Ĉebalta Esperanto-Feriado 25 – EPW
OK: „Juventur P: 2250 Zł. A: 19. 6. 77

● 22.–29. 7. 77 – Warszawa – Bydgoszcz – Tuczno – Poznan – Warszawa
N: TEJO-Feriado por popollernejanoj 11–15 j. „JA“ EPT – 10
OK: „Juventur“ P: 1350 Zł. A: 22. 6. 77

● 29. 7.–5. 8. 77 – Warszawa – Chelmica – Torun – Warszawa
N: Esperanto-Renkontoj en Kujavio-77 17 – EPC
OK: „Juventur“ P: 1200 Zł. A: 29. 6. 77

● 29. 7.–12. 8. 77 – Chelmica – Torun
N: Internacia Esperanto-kurso por instruistoj 29 – EPC
OK: PEA kaj „Juventur“ P: 2100 Zł. A: 29. 6. 77

● 5.–12. 8. 77 – Warszawa – Chelmica – Torun – Warszawa
N: Esperanto-Renkontoj en Kujavio-77 18 – EPC
OK: „Juventur“ P: 1200 Zł. A: 5. 7. 77

● 12.–19. 8. 77 – Warszawa – Chelmica – Torun – Warszawa
N: Esperanto-Renkontoj en Kujavio-77 19 – EPC
OK: „Juventur“ P: 1200 Zł. A: 12. 7. 77

● 12.–26. 8. 77 – Chelmica – Torun
N: Internacia Esperanto-kurso por instruistoj 30 – EPC
OK: „Juventur“ P: 2100 Zł. A: 12. 7. 77

● 14.—27. 8. 77 — Bydgoszcz — Funka — Gdansk — Bydgoszcz
N: Ĉelaga Esperanto-Feriado 35 — EPF
OK: „Juventur“ P: 2400 Zł. A: 14. 7. 77

● 16.—30. 8. 77 — Wladyslawowo — Hel — Gdansk
N: Ĉebalta Esperanto-Feriado 27 — EPW
OK: „Juventur“ P: 2250 Zł. A: 16. 7. 77

● 19.—26. 8. 77 — Warszawa — Chelmica — Torun — Warszawa
N: Esperanto-Renkontoj en Kujavio-77 20 — EPC
OK: „Juventur“ P: 1200 Zł. A: 19. 7. 77

● 24. 8.—6. 9. 77 — Bydgoszcz — Tlen — Gdansk — Bydgoszcz
N: Ĉelaga Esperanto-Feriado 32 — EPT
OK: „Juventur“ P: 2400 Zł. A: 24. 7. 77

● 30. 8.—13. 9. 77 — Wladyslawowo — Hel — Gdansk
N: Ĉebalta Esperanto-Feriado 28 — EPW
OK: „Juventur“ P: 2250 Zł. A: 30. 7. 77

● 2.—4. 9. 77 — Bydgoszcz — Funka — Bydgoszcz
N: Internacia Esperanto Seminario pri Gvidado kaj Organizado en Esperanto Movado
OK: PEA kaj „Juventur“ P: 300 Zł. A: 1. 8. 77

● 3.—16. 9. 77 — Miedzygórze
N: XIII-a Internacia Esperanto-Feriado
OK: Pola Esperanto-Asocio, str. Dubois 3, Wroclaw 17
P: 2400 Zł. A: 1. 8. 77

● 26.—27. 11. 77 — Bydgoszcz
N: V-a Internacia Trarigardo de Lumbildoj „Esperanto-Somero“ 77 / kun premioj /
OK: Klubo „Esperanto“, str. M. Curie-Sklodowskiej 10/4, PL-85-094 Bydgoszcz, kaj „Juventur“
P: 300 Zł. A: 1. 11. 77

● 26. 11.—4. 12. 77 — Bydgoszcz — Zakopane
N: III-a Internacia Foiro de Esperanto Turismo
O: Monda Turismo kaj Turisma Centro de Pola E-Asocio
K: „Juventur“ P: 2400 Zł. A: 1. 11. 77

● 2.—4. 12. 77 — Zakopane
N: Internacia Esperanto Renkonto „Zakopane 77“
OK: „Juventur“ P: 450 Zł. A: 1. 11. 77

● 5-a Studenta Interlingvistika Seminario

Kiel ĉiujare ekde majo 1973 la Studenta Interlingvistika Rondo de la Varsovia Universitato invitas junajn lingvistojn interesiĝantajn pri planlingvoj partopreni en la 5-a Studenta Interlingvistika Seminario. Oni nur ŝanĝis la kutiman daton al pli fruaj Paskaj ferioj por ebligi partoprenon al tiuj, kiuj, ĉiperiode pli facile disponos pri libera tempo. Baze de la decidoj faritaj dum la pasinta 4-a SIS-o, pri la programo ekis decidi la fondita tiam Planlingvistika Esplorforumo, en kies kadroj la organizajn taskojn transprenis nia rondo.

Laŭ la temaro de la Planlingvistika Esplorforumo oni interkonsentis elekti jenajn gvidtemojn:

1. Standarda prononco, ortografio
2. Kategorieco, vortfarado
3. Internaj rilatoj inter elementoj de la frazo.

Por ili estos dediĉitaj 2—3 tagoj. La ceteran tempon ni dediĉos, laŭ la referaĵproponoj, al aliaj temoj.

Organizaj indikoj:

— dato: 13.—16. 4. 1977
— loko: Varsovio
— loĝado: 2—3-personaj hotelĉambroj aŭ en studenta hejmo.
— nombro de partoprenantoj: 30
— partoprenkontizo: 150—350 Zł.
— aliĝdato: 1. 3. 1977
— korespondadreso: Socjalistyczny Zwiazek Studentów Polskich, Rada Uczelniana Uniwersytetu Warszawskiego, Komisja Nauki, Interlingwistyczne Koło Naukowa, Krakowskie Przedmieście 24/26, 00-325 Warszawa.

Hungario:

● 6.—8. 5. 77 — Zamenhof Internacia Pacmarŝo en Montaro Börszöny
OK: Teritoria Komitato de HEA, H-1443 Budapest, Pf. 153
● 7.—9. 5. 77 — Esperanto-Tagoj en urbo Sopron / okaze de 700-jara datreveno /
OK: Esperanto-Grupo „Pacemo", H-9400 Sopron, Kellner u. 12
● 24.—28. 6. 77 — Turismaj tagoj en Okcidenta Hungario
OK: Esperanto-Grupo, H-9901 Körmend, Pf. 11
● 3.—9. 7. 77 — SEU, 15-a Somera Esperanto-Universitato
OK: TIT-SEU, H-5701 Gyula, 48-as tér 11
● 12.—26. 7. 77 — PIT-Pionira Internacia Tendaro
OK: Teritoria Komitato de HEA, H-7601 Pécs, Pf. 2
● 10.—19. 7. 77 — IREN, 10a Internacia Renkontiĝo Naturamika en Abaliget-Pécs
OK: Teritoria Komitato de HEA, H-7601 Pécs, Pf. 2
● 16.—21. 8. 77 — VIS, 6-a Varia Internacia Semajno en Budapest-Szeged
OK: Teritoria Komitato de HEA, H-1443 Budapest, Pf. 153
● 9.—11. 9. 77 — 2-a Aŭtuna Migrado en Montaro Buda
OK: Turisma Komisiono de HEA, H-7601 Pécs, Pf. 2
● 28. 12. 77 — 2. 1. 78 — VEF, 7-a Vintra Esperantista Ferio en Budapest
OK: Teritoria Komitato de HEA, H-1443 Budapest, Pf. 153

Esperantista Lingva Tendaro

Unuafoje estos aranĝita en 1977 la Esperanta Lingva Tendaro. Nia celo estas havigi eblecon al la junaj esperantistoj por la progresigo de la lingvoscio; enkadre de amuziga programo konigi la vivon, aspektojn, kaj labor-rezultojn de nia pli malvasta patrio. Ni estigos kontakton kun la kluboj de la laborista junularo en la urbo; dum vizito de fabriko ni konatiĝos kun la problemaro de la ekonomia vivo.

Per ekskurso, vizito de kinejo, strando, beat-koncerto ni faros rememorinda la partoprenon en la Esperanta Lingva Tendaro. Lingvolernado: La lingva tendaro akceptas aliĝojn por unu periodo: 1.—10. de julio 1977.

En la tendaro oni povas partopreni porkomencantan kaj progresigan kursojn / laŭ libera elekto /.

Je la fino de la periodoj la aliĝintoj povas partopreni en ekzamenoj „A“ aŭ „B“.

Servoj: Kompleta provizo
Mangoj: 1-a tago: varma vespermanĝo
2–9-a tagoj: po tri manĝoj
10-a tago: matenmanĝo kaj tagmanĝo
Loĝo: en 2–4-litaj ĉambroj en Kolegio
Prelegoj: en halo de Kolegio
Krome: biletoj por strando, kinejo, beatkoncerto.

ALIĜO

Aliĝoj okazos ĝis la limdato: 30. 5. 1977
Adreso: Szolnok-a Teritoria Komitato de Hungara E-Asocio,
5006 Szolnok, Pf. 11

Aliĝojn ni konfirmos. Ni povos zorgi nur pri la regule aliĝintoj.
Partoprenkotizo: 1500 Ft. aŭ egalvalora valuto.

Enpagojn ni akceptas nur por la plena tempodaŭre. La aliĝantoj povas asigni la partoprenkotizon al la ĉekkonto: OTP, Körzeti

Fiók 450-98149-582 számu MESZ Szolnoki Területi Bizottsága,
Szolnok elnevezésü részletezö számlára.

Por aliĝontoj surloke dormejon ni ne povas garantii.

★

Ekzamenoj en Popola Altlernejo

Verŝajne unuafoje en GDR popola altlernejo oficiale ekzamenis studintojn de Esperanto, la Esperanto-klaso en la Popola Altlernejo Berlin - Prenzlauer Berg. La 25an de januaro oficiale, en ĉeesto de la vicdirektoro oni ekzamenis la kandidatojn, kiuj dum du semestroj studis la internacian lingvon.

La akiritaj rezultoj plene surprizis la vicdirektoron. Preskaŭ ĉiuj ekzamenitoj respondis la demandojn en Esperanto, neeblaĵo por alilingvaj kursoj. La gvidantino de la kurso s-ino Hella Sauerbrey plene povas kontenti.

★

„Junge Welt“ pri Esperanto

En la numero de 5./6. 2. 1977 „Junge Welt“, la centra organo de la Centra Konsilantaro de Libera Germana Junularo (Freie Deutsche Jugend, FDJ) publikigis artikolon pri Esperanto de Rita Krips. Tio estas dum 6 monatoj la dua fojo, ke „Junge Welt“ raportis pri la internacia lingvo.

Ekspozicio okaze de la Ruĝa Oktobro

Honore al la 60-a datreveno de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio la geesperantistoj el Karl-Marx-Stadt (GDR) intencas aranĝi internacian letervesperon kune kun migranta ekspozicio. Ni ĝentile petas ĉiujn gekamaradojn en la tuta mondo, helpi al ni per la sendado de salutskribaĵoj, kartoj, laŭeble kun Lenin-poŝtmarkoj aŭ poŝtmarkoj koncernantaj la revolucion de 1917 mem. Por la ekspozico migranta ni bezonas ĉefe Lenin-afiŝojn kaj afiŝojn pri ĉiuj aliaj eminentaj gvidantoj de la klaskonscia laboristaro kaj personoj. Ni volonte akceptos ĉion alian specialan materialon pri la revolucio, ekonomia konstruado ktp. Niaj aranĝaĵoj okazos sub la devizo: Amikeco kun la Granda Soveta Unio!

La geesperantistojn el la kapitalismaj landoj ni treege petas, transsendi al ni simpatideklarojn, rezoluciojn kaj konvenan materialon. De vi ni volonte ricevus opiniojn pri la socialismo kaj socialismaj landoj ĝenerale kaj pri la transformiĝo en la propraj landoj, depost la ekzistado de la „Ruĝa Oktobro".

Krom la popularigo de Esperanto ni celas plifirmigi kaj pliprofundigi la sentojn kaj pensojn rilate la internacian solidarecon kaj proletaran internaciismon.

Respondo estas garantiota! Al ĉiuj ni tre dankas anticipe! Kiu deziras ricevi nian broŝuron pri la historio de la iama Laborista Esperanto-Movado en niaj urbo kaj distrikto, bonvolu mencii tion speciale. Ĝi estas germanlingva broŝuro.

Karaj gekamaradoj! Ni konsideru, ke la „Ruĝa Oktobro" fakte estis la komenciĝo de vere nova epoko por la homaro de la mondo. Tial la „Ruĝa Oktobro" estos eksterordinara jubileo!

Bonvolu sendi ĉion laŭ jena adreso: Alfred Müller, 90 Karl-Marx-Stadt, Karl-Liebknecht-Str. 47, Germana Demokratia Respubliko.

★

Al niaj sovetuniaj kunlaborantoj

Ni tre volonte estonte daŭre publikigos de vi interesajn kontribuaĵojn pri la agado de la esperantistoj en USSR. pri diversaj teoriaj temoj k. t. p. Ni transdonas ricevitan peton al tiuj kunlaborantoj, kiuj troviĝas en la Rusa Federacia Soveta Respubliko (krom Leningrado) sendadi al ni la artikolojn, se eble, pere de la Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetuniaj esperantistoj en Moskvo, aŭ disponigi al la Komisiono kopion de la artikoloj dediĉitaj por „der esperantist". La redakcio

★

Al la iamaj membroj de GLEA!

La armea muzeo de GDR bezonas por ekspozicio kaj kolekto de insignoj la insignon (aŭ insignoj) de Germana Laborista Esperanto-Asocio, IPE, SAT kaj aliaj Laborist-esperantistaj organizoj de germanlingvujo.

Bonvolu sendi la insignojn al Centra Laborrondo Esperanto, 108 Berlin, Charlottenstr. 60.

Eĉ tio okazis

Oscedu singarde!

La brita kuracisto Ivor Falstein laŭdire eltrovis, ke seksignorantoj tendencas al ofta oscedado. Dum esploro de la kaŭzoj li ne kredis al la kutimaj klarigoj — enuo, laceco — sed konkludis, ke eksterordinare ofta aŭ evidente senkaŭza oscedado de plenkreskuloj atestas „esprimon de seksa nematurecо“ aŭ „signon de malmulta seksa energio kun ofta fiasko“.
Tamen multaj kolegoj de Falstein pridubas tiun tezon.

Moderne

Nekonataj ŝtelistoj en Uelzen (GFR) evidente adaptiĝis al la aktuala merkata situacio en kapitalismaj landoj, kie oni disvendas terpomojn je prezo de noblaj legomoj. Dufoje ili enpenetris provizejon kaj ŝtelis entute 1000 kg de la luksaj tuberoj.

Timas pluvon

La usona ambasadorejo en Liberio ŝajne ne volas perdi tempon, se temas pri festado. Je ilia instigo la usonaj enloĝantoj de Monrovia jam la 21-an de februaro festis la 4-an de julio, la nacian festotagon de Usono. Klarigo de la ambasadoro Bean: „En julio ni troviĝos enmeze de la pluva sezono!“

Neintencitaj sekvoj

En Cambridge (Britio) literatur-studento Sidney Barnes agis kiel amatora hipnotisto. Sukcese li kuracis sian dommastrinon, kiu kaŭze de ŝoko estis perdinta la kapablon aŭdi. Du semajnojn poste la dommastrino senvalidigis la loĝ-kontrakton, asertante, ke ŝia subluanto kaŭzas tro da bruo.

Ankaŭ legado klerigas

Okaze de opini-enketo pri la utilo de televiďado, advokato en Stockholm (Svedio) respondis: „Televidado eĉ ege altigas la klerecon. Kiam mia familio kaj niaj gastoj sidas antaŭ l'ekrano, mi trankvile iras en apudan ĉambron kaj legas bonan libron“.

Al fajfado kutimita

Pro nereago je la fajfado de trafika policisto Nelly Goodman en San Diego (Usono) devis aperi en juĝejo. Ŝi diris: „Se mi haltus ĉiufoje, nur ĉar postajfas iu viro, mi ja neniam atingus la celon“. La belaspekta juna virino ricevis nur oficialan admonon.

Escepte de tio

Komercaj leteroj de teksaĵ-firmao en Malmö (Svedio) laste portis ruĝan stampon en la dekstra suba angulo, kun la vortoj: „Bonvolu pardoni la tajp-erarojn. Escepte de tio la knabino estas dolĉa!“

Je deziro

Anonceto en la itala gazeto „Il tempo“: „Juna virino, laŭ deziro trankvila kaj karakterhava, serĉas edzon“.

Konsiloj

Konsilojn por estontaj verkistoj peras la angla gazeto „Mirror“ tamaniere: Kopii unu libron — plagiato! Kopii du librojn — eseo! Kopii tri librojn — doktora tezo! Kopii kvar librojn — kvina klera libro!

Kompilis Linde Knöschke

I-a Distrikta Junulara Konferenco en Neubrandenburg

La 21-an de novembro 1976 en la domo de Kulturligo en Neubrandenburg okazis la I-a Distrikta Junulara Konferenco de esperantistoj. Kunvenis 27 gejunuloj por utiligi la laboron de la E-junularo kaj interkonsiliĝi pri venontaj laborintencoj. Werner Pfennig, prezidanto de DLR, povis bonvenigi delegacion de 5 polaj gastoj, inter ili la vicprezidanton de PEA-filio Koszalin, sinjoron Tadeusz Sobieraj. El nia respubliko sekvis la inviton Rita Krips, prezidantino de la Junulara Komisiono de CLR Esperanto en Kulturligo de GDR, kaj samideanoj el la distriktoj Potsdam kaj Rostock.

Kiel reprezentanto de la Kulturligo-Estraro sekretario Paul Brinkmann partoprenis la renkontiĝon.

Dum la konferenco Brunhilde Pfennig, prezidantino de la junulara laborgrupo, informis pri la E-laboro de la junaj esperantistoj en distrikto kaj pri venontaj intencoj por la jaro 1977.

Poste d-ro Marian Laba, membro de la pola delegacio, amplekse raportis pri la Universala Kongreso de Esperanto en Ateno kaj pri la Junulara Kongreso en Tesaloniki. En sia eminenta prelego li ankaŭ montris per lumbildoj la valorajojn de la greka arkitekturo.

Kelkajn gravajn problemojn de la junulara E-movado en GDR komentis Rita Krips.

El la interŝanĝo de spertoj inter la gastigantoj kaj la amikoj el Rostock rezultiĝis multaj novaj stimuloj por la venontaj intencoj de esperantistoj en ambaŭ distriktoj. Ekde nun Distrikta Junulara Konferenco okazos ĉiujare por ke ĝi fariĝu bela tradicio. Carola Lehr

★

Prelego en lernejo

La 27. 10. 1976 s-ano Michael Behr el Leipzig-Markkleeberg prelegis pri la signifo de Esperanto en la klasbatalo de la 20-aj jaroj kaj pri ĝia aktuala graveco antaŭ lernejanoj de la politeknika lernejo en Eythra.

Forpasis la bulgara peranto por „der esperantist“

Kun granda bedaŭro ni devas informi, ke la 13an de januaro 1977 subite forpasis Enjo Daskalov el Vraca/Bulgario. Li estis la ĉefa organizinto de la TEJO-kongreso en 1963 en Vraca kaj senlaca esperantista aganto en Bulgario. Li tre energie kaj vigle peradis „der esperantist“ al la bulgaraj abonantoj.

Nova peranto estas la administra sekretario de Bulgara Esperanto-Asocio, k-do Čaljovskij.

Korekto

En „de“ 6/76, p. 12 la temo de la 32-a Kongreso de TEJO devas esti „Lingvo kaj socio“.

Kunsido de CLE en Weimar

En la tempo de la 5-a ĝis 6-a de februaro 1977 okazis en Weimar (pr. Vajmar) la unua plenkunsido de la novelektita CLE (Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR). La kunsido laboris vigle, kritike kaj konstruktive.

Ĝi aŭskultis kaj diskutis raportojn pri la 2-a Centra Konferenco de la GDR-Esperantistoj en Leipzig (pr. Lajpcig), pri UEA kaj TEJO, pri la UK en Varna 1978 kaj pri la 9a Konsultiĝo de la gvidantoj de la Esperanto-organizoj de la eŭropaj socialismaj landoj.

Sekvis koncizaj raportoj de la unuopaj distriktoj pri la ĝisnuna kaj estonta laboro kun valoraj spertoj kaj sugestoj, kiuj donis novajn impulsojn kaj stimulojn al ĉiuj partoprenintoj.

Plue la membroj de CLE diskutis kaj unuanime akceptis la laborplanon por la jaro 1977, kiu enhavas interesajn intencojn kaj taskojn, inter alie rilate al la preparoj okaze de la 60-a jubileo de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio. Ili konstatis konstantan pluevoluon de la junulara laboro kaj bonegan evoluon de la korespondaj kursoj en ĉiuj distriktoj. Ankoraŭ dum tiu jaro okazos diversaj seminarioj kaj en la distrikto Suhl okazos intensa kurso.

Ni partoprenos kompreneble per niaj eblecoj al la preparo de la 9-a Liga Kongreso de la Kulturligo de GDR, kiu okazos en septembro 1977. La du laborplenaj tagoj finiĝis optimisme por nia estonta laboro.

Rudi Graetz

★

Kiu kontaktos niajn hungarajn amikojn?

El letero ricevita:

Nia grupo ekzistanta en Nordorient-Hungarlando, serĉas tiun germanan Esperanto-rondon klubon), kiu havas emon kontaktiĝi kun ni kiel ĝemelurbo (fratrondo).

Bedaŭrinde ĝis nun malgraŭ niaj klopodoj ni ne sukcesis trovi por niaj korespondantoj tiun klubon.

Ni petas vian helpon, ni promesas, ke ni ŝatus formi bonajn kaj rezultplenajn kontaktojn, kunlabori kun germanaj esperantistoj kaj, se estas eble fari kontrakton pri kunlaboro.

Ni prezentas nian fakrondon: Nuntempe en nia fervojista fakrondo membras 35 plenkreskulaj membroj, krome 10—45 apogantoj kaj gepionir-membroj. Inter fervojistoj oni trovas ĉefe pedagogojn kaj aliprofesiajn homojn.

Nia urbeto kalkulas pli ol 90 mil da loĝantoj. Ni povas jam ĉisomere favore akcepti la delegitaron el la proponita urbo. Ni atendas baldaŭan respondon: „Por la mondpaco“, Fervojista Esperanto-Fakgrupo, 4400 Nyiregyhàza, Toldi u. 23, Hungario.

Junaj esperantistoj de GDR renkontiĝis

Ekde la 3-a ĝis la 5-a de septembro 1976 okazis la 3-a esperantista renkontiĝo por gejunuloj el Germana Demokratia Respubliko sur la teritorio de la internacia kampadejo „Intercamping Krossinsee“ ĉe Berlin. La plejmulto de la 30 partoprenintoj alvenis la 3-an de septembro posttagmeze. Sabate matene ni okazigis la „solenan inaŭguron“ de la seminario. La temoj pritraktitaj de tiu programparto estis i. a.

- la atingita nivelo de la junulara Esperanto-movado en nia respubliko kaj ĝia estonta evoluo,
- projektoj por la kunlaboro kun la junulara organizo de GDR-LGJ (komjunularo de GDR),
- ideoj kaj proponoj por la longtempa planado rilate al la junulara movado en GDR,
- novaĵoj el la diversaj distriktoj,
- lingva kvalifikado,
- la situacio en la internacia Junulara Esperanto-movado,
- kial Esperanto estas interesa por gejunuloj kaj
- travivaĵoj personaj per Esperanto.

Krome menciindas lumbildparoladoj pri UEA-kongreso en Ateno (d-ro Detlev Blanke) kaj pri la internacia tendaro en Lanĉov / ČSSR (Hans-Peter Bartos). Post la vespermanĝo oni sin povis amuzi laŭ muziko de diskoteko. La sekvan tagon oni diskutis i. a. la temon „kiel argumenti por Esperanto“ en du diversaj grupoj. La „spertuloj“ diskutis en Esperanto, la malpli (ankoraŭ) spertaj germanlingvis. La renkontiĝo de la junaj esperantistoj montris, ke regulaj renkontiĝoj (seminarioj, konferencoj k. s.) estas nepre necesaj por kuraĝigi la junajn agantojn, por diskuti aktualajn problemojn, klarigi iujn demandojn kaj por praktiki la lingvon. La eĥo de la partoprenantaro estis pozitiva.

R. K.

Serĉata!

Mi serĉas la *jarlibrojn de UEA* 1927—1929, 1931, 1933, 1935, 1937—38, 1941—1948 kaj la *jarlibrojn de Internacia Esperanto-Ligo* 1937—1938, 1941 — 1944. *SAT-kongresaj protokoloj* 1921 — 1923, 1925, 1927, 1929, 1932—1939.

„*Scienca Revuo*“ (post 1945) n-roj 1—28, 30—32, 45—46, 69. Bv. sendi ofertojn al d-ro Detlev Blanke, Centra Laborrondo Esperanto, DDR-108 - Berlin, Charlottenstr. 60.

„*der esperantist*“, n-roj 1, 2, 7, 8, 18, 19, 24, 43, 52. Rekompenco laŭ ampleksa listo de diversaj Esperanto-revuoj. D-ro Árpàd Rátkai, H - 6721 - Szeged, Lengyel 4, Hungario.

“*Esperantisto Slovaka*“ kun specimenoj el Plena Vortaro de Esperanto a - e (Ekde „enigi“ mi havas) kontraŭ dezirata kompenso. Oskar Stollberg, DDR - 705 - Leipzig, Erich-Ferl-Str. 78.

[redacted]

[redacted]

Kursanoj de E.-societo „Leono“, 4468 **Momina Klisura,** (14—37j.) dez. kor. tutmonde

Jordano Nikolov, prezidanto de E.-societo „Leono“, 4468 **Momina Klisura,** dez. kor. tutmonde

Instruisto, 33j., dez. kor. kun esp. el GDR p. ĉ. t.: Goran Trifonov, 7300 **Kubrat,** str. Jantra 1

Grupo de 15 geesperantistoj, 16—24j., dez. kor. k. geamikoj el GDR, skribu al: Andrej S. Guŝev, 2800 **Sandanski,** ul. G. Skrijovski 13

Flegistino, 26j., dez. kor. k. gefilatelistoj: Svetlana Georgieva, **Pazarĝik,** ul. Silistra 4

Gejunuloj ĝis 20j. dez. kor. kun GDR-amikoj: Galja Markova, 7800 **Popera,** Aurova 31 — Penka G. Gambazora, 9200 **Provadia,** str. „Skobelev“ 7 — Neli Vasileva, 9005 **Varna,** KV. „Čajka“ bl. 66, ap. 15 — Bogdana Stojanova Atanasova, 7000 **Ruse,** Bul. „Lenin“ Nr. 137A — Darina Minĉeva, 5300 **Gabrovo,** ul. K. i Metoch 20 — Denka Penĉeva, 5300 **Gabrovo,** Str. N. Gerov 41 — Jordan Kalĉev, 4550 **Peŝtera,** Rua Pirin **Nr. 39**

[redacted]

Roland H. Hegen, Schloßgasse 30, **D-6731 Elmstein** 2 (Iggelbach), dez. kor. k. pac-amikoj el GDR

[redacted]

Lernanto, 15j., dez. kor. tutmonde pri sporto, kol. pm, bk: Uwe Burock, **801 Dresden,** Kaitzer Str. 6

30-membra E-rondo, 16—45j., komencantoj k. progresintoj, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., skribu al: Kulturbund der DDR, BAK Esperanto, 20 **Neubrandenburg,** An der Linde 2

[redacted]

Felix Martin Triep, Doctor Alcay 12.3.°C, **Zaragoza,** dez. kor.

[redacted]

Junulino, 16j., komencantino, dez. kor. k. komencantino: Aniko Ori, **1032 Budapest,** Szölö köz. 3. IX. 26

István Bognar, **H-8100 Varpalota,** Kilian Gy. u. 6, (21j.), dez. kor. k. fraŭlino 19—22j.

Instruisto, 28j., dez. kor. k. germanaj esperantistoj: Živko Mandiĉ, 7700 **Mohács,** Radnóti ltp. 22

Grupo el Budapest dez. kor. k. GDR-amikoj 18—25j., skribu al Istrai Repenere, 1156 **Budapest,** Kentyfa u. 8 IV. 13

[redacted]

Esperanto-Klubo, **Braŝov,** C. P. 99, dez. kor. k. Esperantaj kluboj kaj asocioj tutmonde, prec. k. sovetuniaj kaj soc. landaj kluboj

[redacted]

Juna kuracisto dez. kor. pri sporto, kosmo, pentraĵoj k. fotoj: Baltrus Venislova, **Joniŝkolis,** Hospitalo

16 gejunuloj k. studentoj, 16—20j., dez. kor. k. GDR-amikoj, skribu al Saulcerite Neilande, **Riga 14,** Glika 9—2, Latv.

Instruisto dez. kor.: Vladimir Opltajev, 625009 **Tjumen,** abonk. 139

Studentino dez. kor.: Malich Viktorija, 340066 **Glavpoŝtamt,** Do vostrebovanija

Studentino, 20j., dez. kor.: Pjeĉorkina Eugenia, 660075 **Krasnojarsk,** P. K. 2420, Siberio

Studentinoj Galina kaj Rita Simonova, 454049 **Čeljabinsk,** 7. Fabrično zarvodkaj perenlok, 27, dez. kor.

Studentino, 17j., dez. kor.: Tatjana Haritschkina, 483311 **Talgarskij r-n,** p. GES, Alma Atiuskaja obl., Kasaŝskaja SSR

Studentino dez. kor.: Esti Olt, 202020 **Koltpa-Jarve** 3, str. Sakalu 18

Lernantino, 17j., dez. kor.: Liida Luik, **Pölva,** Vana Koiola

---

Herausgeber: **Kulturbund der DDR**
(Zentraler Arbeitskreis Esperanto).
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60.
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. - Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. - Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 354